

Aŭtoro : Anna Rudawcowa

Tradukinto : [pl-eo] A. Walaszek

(semantika, senrima traduko el 12-a
numero de junulara revuo *Płomyczek*
eldonitan 18-an de novembro 1935.)

B A L T O - R E Ĝ O



KNABINETO: (*sidas sur sablo, ĉe marbordo*) Ĉu scias vi, maro, amata mia, ke vi belaspektas, kvankam mi timas vin ? Vi kapablas esti timiga kaj terura dum tempesto, kiam sur vin saltas ondoj, kiam supre vento pelas nigrajn nubojn ... Tiam vi ne estas safira, sed grize-bruna kaj vi rememoras furiozan beston, kiu arkigis dorson, graŭlas kaj dentojn montras. Eĉ en iritiĝo kaj kolero vi kapablas belaspekti ... Sed tiam mi silente surgenuiĝos kaj preĝos por vi longe, al Stelo de'l Maro, ke vi silentiĝu, por ke ne okazu pli malbone. Por ke ŝipvojaĝantoj ne perdiĝu en maro, sed ekvidu lumon de mara lanterno. Por ke fiŝistoj feliĉe revenu el fiŝkaptado kaj por ke vi estu denove milda, kiel hodiaŭ. (ŝi kuŝiĝas sur sablo). Viaj ondoj – bluaj ludantoj, tiel bele kantas ! (dormeme) Rakontu al mi fabelon ! (ekdormas).

NIMFOJ: (*eliras maron kaj ĉirkaŭas knabineton*) Potenca Balta Reĝo al vi ekspedas siaj kortegulinojn.

KNABINETO: (*leviĝas kaj ĉirkaŭrigardas mirigita*)

Ĉu mi eksongis ? Kiu vi estas ?

I-a NIMFO : Nimfoj, maraj fraŭlinoj !

II-a NIMFO : El arĝenta ŝaumo estas niaj roboj !

III-a NIMFO : Ĉe lunlumo kaj ĉe ĝia brilo, ni tre ŝatas danci sur sablo !

IV-a NIMFO : Harojn ni kombasas per korala kombilo ...

V-a NIMFO : De tempo al tempo ni flosas malproksimen ...

KNABINETO: (*al si*) Iom mi timas ... mi volas reveni al patrino ! ...

I-a NIMFO : Ĉu vi volas ? Ni ekdancos al vi ...

II-a NIMFO : Ĉu vi volas ? Ni ekkantos al vi ...

(*Nimfoj dancas ĉirkaŭ la knabineto kaj kantas*)

Estas belaj palacoj, palacoj el sukceso, ĉirkaŭ estas – majestaj ĝardenoj kaj ĉio en maraj, verdaj profundoj, fore, fore sub akvo. Jen nia regno, tie ĉio estas alia, ne tia, kiel sur la tero : tie fiŝetoj naĝas gajaj kaj lertaj, flagrante per oraj okuletoj. Tie regas BALTO-reĝo, potenca kaj granda ! ... Venu al ni ! Venu al ni, etulino ! Ni kolektos rozajn konketojn kaj per boato ni vin veturigos ! (*Nimfoj kuntrenas la knabineton, kiu iom kontraŭstaras.*)

KNABINETO : Sed ... mi ne scias ... mi ... mi iom timas ! ...

BALTO-reĝo: (*elakviĝas*) Nimfoj ! Lasu knabineton en trankvilo ! Pli bone ŝi revenu hejmen, al patrino.

NIMFOJ : (*kun profunda riverenco*) Reĝo ! Vi estas reganto nia ! Ni vin obeas ! (ili postasistas lin, kaj BALTO-reĝo aliras knabineton.)

KNABINETO : (*mirigita*) Kiu vi estas, Sinjoro ? ekvolu respondi !

BALTO-reĝo: (*kun rideto*) Rigardu – sukcenan kronon mi portas.

KNABINETO: (*fiksrigardas lin*) Vi surhavas mantelon en onda koloro, bukitan per koralbroĉo. Mi scias, vi estas BALTO-reĝo !

BALTO-reĝo: (*li surmetas manon sur ŝian kapon*) Vi divenis, knabinjo ! La marsurfacon kaj marprofundon mi regas. La teron mi brakumas ...

KNABINETO: (*ĝoje*) Mi konas vin ! Vi estas granda kaj potenca reĝo !